# Boletín

nº 423 Julio - Septembro 2018



Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 423

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj
* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn
*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro
Financaj aferoj: financoj@esperanto.es
Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

**Hispana Esperanto-Federacio**
***Federación Española de Esperanto***

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31 0204011961
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon en la aŭtomata respondilo)

**Estraro**

**Prezidanto:** José Antonio del Barrio
**Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López
**Sekretario:** Águeda Biurrun
**Kasisto.** Jesús M. García Iturrioz
**Voĉdonantoj:** Eduardo Berdor
Raúl Martínez
**Prezidanto de HEJS:** William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400


# Salutvortoj

Karaj geamikoj:

*Boletín* revenas al vi post vere intensa somera sezono por multaj esperantistoj de Hispanio. Tre gravaj renkontoj okazis en la Iberia Duoninsulo, kiun esperinde multaj el niaj legantoj povis ĝui, kelkfoje por la unua fojo. Nia Hispana Kongreso ĉifoje kombiniĝis kun faka internacia renkontiĝo, tiu de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, por krei preskaŭ universalan etoson, kun partopreno de homoj el kvar kontinentoj, kiuj povis konatiĝi kun la hispanaj kulturo kaj movado. Poste, alta kvanto da esperantistoj povis vojaĝi el Hispanio al nia najbara ĉefurbo Lisbono, kaj ĉeesti buntan kaj sukcesan Universalan Kongreson. Tre sukcesa estis ankaŭ la Internacia Junulara Kongreso kiun niaj junuloj organizis en Badajoz, bone muntita, kun altira programo kaj kun partopreno de multaj novuloj, ankaŭ de nia lando, kiuj povis konatiĝi unuafoje kun la esperantista etoso. Pri ĉiuj ĉi renkontoj vi povos amplekse legi en tiu ĉi numero.

Niaj renkontoj povis plenumi la du ĉefcelojn kiujn HEF fiksis por si dum tiu ĉi jaro: unuflanke intensigi kaj plibonigi la instruadon de nia lingvo, konektante instruistojn inter si kaj montrante alies spertojn; kaj aliflanke proksimigi la novajn lernantojn, ĉefe la junulojn, al la Esperanto-komunumo kaj konatigi ilin kun nia kulturo.

La akademia jaro kiu normale komenciĝas en septembro ja estos jaro de lernado por HEF. Ni scias ke multaj el niaj kluboj jam ekorganizis siajn kursojn, kaj ni krome esperas el tio plian revigligon de la hispana ILEI-sekcio. Sed ni havas grandan esperon pri la nova sperto: la organizado de oficiala kurso de Esperanto en la Lingvo-Centro de la Universitato UNED, por kies sukceso ni petas ĉies apogon.

(Iru al la paĝo 2-a)

# ENHAVO


| | |
|---|---|
| Salutvortoj | 1 |
| Eksterordinara Ĝenerala Kunveno, Protokolo | 3 |
| Kotiz-tabelo UEA 2019 | 4 |
| Jam eblas enskribiĝi en la Kurso de E-o UNED | 5 |
| Nova eldono de la Ekspozicio de HEF | 6 |
| Raporto pri la 77-a Hispana Kongreso de E-o Madrido | 7 |
| Kongrese Ekssprese | 10 |
| ILEI kongresis en Madrido | 11 |
| La 103-a Universala Kongreso de Lisbono | 13 |
| La IJK aŭ kiel antaŭenpuŝi nian movadon | 16 |
| Hispanoj omaĝitaj ĉe UEA | 18 |
| Pri Grupoj kaj Asocioj | 20 |
| Nekrologoj | 22 |
| Aliĝilo pri la 71-a Kongreso de IFEF en Malago 2019 | 23 |
| Aliĝilo pri la 77-a Hispana Kongreso en Malago 2019 | 24 |
| Ĉambro mendilo pri Kongresoj de IFEF kaj HEF | 25 |
| Provizora programo de IFEF kaj HEF kongresoj | 26 |
| 26-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo | 28 |
| Poezia Angulo | 30 |
| Datreveno de deklaro de Ordesa kiel Nacia Parko | 32 |


Kovriloj: Geredaktoroj de Esperanto kaj Bulteno revuoj/Postkovrilo ĉeestintoj de ILEI 2018

(Daŭrigo de Salutvortoj, paĝo 1a)

Ankaŭ ni kovas grandajn esperojn pri la relanĉo kaj revivigo de la junulara sekcio, HEJS, kiu havas novan gvidantaron, kaj kreis novajn retojn de komunikado. Ni aprobis por ili novajn koti-zojn, esperеble pli altirajn, kaj ni faras alvokon al la kluboj, aktivistoj kaj instruistoj, flegi la aktivadon de la novuloj. Ili sciu ke Esperanto ja vivas, kaj ke indas flegi la retojn de organizado.

Mi volas fini per publika gratulo el tiuj ĉi paĝoj: kiel vi povos legi en aparta teksto, dum la UK oni anoncis ke nia iama prezidantino, María Rafaela Urueña, estis akceptita kiel Honora Membro de UEA. Nia asocio ja sentas sin malrekte honorigita per tiu nomumo, tiom meritita. Gratulon, Rafi!

*José Antonio del Barrio,*

# EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO PROTOKOLO

La 21-an de julio de 2018, je la 10:00 horo (dua alvoko) okazis la Eksterordinara Ĝenerala Kunveno en la universitata rezidejo Teresa de Jesús, en Madrid.

Ĉeestis la estraranoj: Ángel Arquillos (vic-prezidanto), Jesús M. García Iturrioz (kasisto), Águeda Biurrun (sekretario) kaj José Antonio del Barrio (prezidanto), kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ aliaj 20 individuaj anoj kaj 5 kolektivaj membroj (Andaluza E-Uniĝo, Kantabra E-Asocio, E-Grupo Bilbao, Liberanimo de Teruelo kaj Madrida E-Liceo) reprezentataj de kvin el la ĉeestantaj individuaj membroj, entute 29 partoprenantoj.

La sesio disvolviĝis laŭ la jena tagordo:

1.- Legado, diskuto kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (13a majo 2018)
Oni aprobis unuanime la protokolon de la antaŭa kunveno aperintan en Boletín n-ro 422.

2.- Revizio kaj aprobo de la kotizsistemo por 2019.

En la Ordinara Ĝenerala Kunveno oni lasis tiun ĉi punkton por la Eksterordinara Kunveno, por ebligi pli ampleksan diskuton.

Post diskuto de la temo kaj pro sugesto de la Prezidanto, oni aprobis, ke se almenaŭ du membroj de lokaj kluboj de malpli ol dek membroj jam pagas la kotizon de HEF, tiuj lokaj kluboj ne devas pagi apartan kotizon, kaj konservas la samajn rajtojn.

Ankaŭ oni aprobas, ke tiuj junuloj kiuj jam estas membroj de loka klubo kiu siavice estas kolektiva membro de HEF, pagu pli rabatitan kotizon de 10 €.

3.- Parta renovigo de la estraro, se necese.

Ne povis okazi dum la Kongreso la antaŭvidita kunveno de la junulara sekcio, por elekti novan prezidanton de HEJS por anstataŭi la nunan, Alejandro Escobedo, kiu nuntempe loĝas en Ĉinio kaj ne povas labori pri tiu posteno. La kunveno de la junulara sekcio okazos dum la IJK en Badajoz.

Do, oni decidas ne fari renovigon de la estraro.

4.-Projektoj por 2018-2019

La Prezidanto informas pri la kurso de Esperanto de la UNED, ĉefa projekto por 2018-2019. La kunveno deziras montri la gratulon al la agado de Manuel Pancorbo.

Manuel Pancorbo informas pri la selektado de instruistoj por tiu kurso kaj pri la venontaj demarŝoj. Li proponas, ke la kandidatoj kunvenu por prepari la materialon: lernolibroj, ekzercoj, videoj, ktp. Li ankaŭ sugestas, ke HEF donu atestilon al la lernantoj krom tiu oficiala de UNED.

Alia projekto por 2019 estos fortigi la junularan sekcion de HEF.

La prezidanto informas pri la disponebla mono por projektoj por 2019.

Miguel Gutierrez Adúriz proponas kiel projekton la kolektadon de artaj agadoj de Miguel Fernández por diskonigi ĉion kune. La estraro studos la aferon.

HEF preparos la Kongreson 2019 en Malago, kune kun la kongreso de la Fervojista Asocio IFEF.

5.- Sugestoj kaj demandoj.

Oni dankas la laboron de la LKK pri tiuj Kongresoj de Madrido 2018.

Sen pli de aferoj por pritakti, finiĝas la kunveno je la 11,00 horo.

La Prezidanto — La Sekretario

**José Antonio del Barrio Unquera** — **Águeda Biurrun González**

---

**KOTIZTABELO UEA 2019**

Peranto: Pedro A. Garrote. Hisperanto.uea@gmail.com/ Banco Santander Valladolido
IBAN en elektronika formato : ES5600306002740000901271
IBAN paperformate : IBAN ES56 0030 6002 7400 0090 1271

| | |
|---|---|
| **MB** — Membro Baza, kun reta aliro al UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro). | 27 € |
| **MA** — Membro-Abonanto, kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon **Esperanto papere**. | 57 € |
| **DMB** Dumviva baza membreco (kiel MB, sed dumvive). DMB = MB x 30 → | 810 € |
| **DMA** — Dumviva Membro-Abonanto (Kiel MA, sed dumvive), DMA=MA X 30 → | 1710 € |
| **MB (-50%)** — Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro estas 20—25 jara je la komenco de la kotizata jaro). ← bonvolu nepre plenigi la naskiĝdaton! | 14 € |
| **MB (-75%)** — Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro ne estas pli aĝa je 19 jaroj je la komenco dela kotizata jaro | 7 € |

# JAM EBLAS ENSKRIBIĜI EN LA KURSO DE ESPERANTO DE LA UNIVERSITATO UNED

Komence de septembro malfermiĝis la periodo de enskribiĝo ("matrícula") por la kurso de Esperanto kiun dum tiu ĉi akademia jaro proponas la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) en sia centro CUID (Universitata Bita kaj Neĉeesta Lingvo-Centro).

Kiel ni informis en la pasinta numero de Boletín, Hispana Esperanto-Federacio subskribis oficialan interkonsenton por zorgi pri diversaj aspektoj de la instruado, inter kiuj la pretigado de la lernomaterialo, la apogo en la selektado de la instruisto, la kreado de la gvidilo de la kurso, la disvastigo de la kurso, ktp.

La kurso havas oficialan karakteron, kaj havigos al ĉiuj studentoj ĝin sukcesontaj la diplomon de la nivelo A2 laŭ la Eŭropa Referenckadro.

La kunordiganto de la kurso estas Manuel Pancorbo, membro de HEF kaj docento pri Fiziko de tiu universitato. Por instrui la kurson oni malfermis kunvokon komence de septembro, kun objektivaj kriterioj. Por tiu posteno estis nomumita Félix Jiménez Lobo, kaj eblos nomumi alian se la nombro de lernantoj tion ebligos.

La UNED multe engaĝiĝis dum tiuj ĉi monatoj, inter alie per la gastigado de la plejparto de la kongreso de ILEI en Madrido en julio. La vicrektorino pri esplorado kaj internaciigo, Esther Souto, prezidis la oficialan inaŭguron de la Kongreso, kun tre varmaj vortoj, inter kiuj kelkaj en Esperanto. Alia instruisto de la Fakultato de Filologio, Nuria Polo, kunprezidis la Simpozion pri "La kultura heredaĵo de Esperanto" organizita ene de la Kongreso, en kiu prelegis interalie ankaŭ la direktorino de la centro CUID Silvia Barreiro. Krome, en la retejo de la UNED vi povas trovi diversajn materialojn pri la kurso, la kongreso kaj Esperanto ĝenerale.

Necesas nun disvastigi tiun ĉi altan atingaĵon, por maksimumigi la nombron da aliĝontoj al la kurso, kaj ebligi la kompletan disvolviĝon de la projekto.

UNED



# NOVA ELDONO DE LA EKSPOZICIO DE HEF




Dum la tuta daŭro de la madridaj kongresoj estis montrita ekspozicio pri Esperanto en la halo de la universitato UNED, kiun ĉiuj vizitantoj povis rigardi detale.

Temis pri nova eldono de la ekspozicio jam montrita en diversaj partoj de Hispanio, konsistanta en 15 paneloj (grando: 100 x 70 cm), kiu pritraktas diversajn aspektojn de Esperanto, ĝia kulturo kaj komunumo.

En la nova eldono oni profitis por iom ŝanĝi kaj renovigi la aspekton kaj aktualigi parton de la enhavo, ĉefe tiun rilatan al Esperanto en la reto. Pri la grafika aspekto zorgis (kun la speciala helpo de Miguel Gutiérrez Adúriz) du fratinoj spertaj pri organizado de ekspozicioj, Natalia kaj Patricia Pintado, nepinoj de la iama prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio, mortpafita post la hispana milito, Sidonio Pintado, kiuj deziris kunlabori kun nia asocio kiel omaĝo al sia avo.




La paneloj estas je la dispono de asocioj kaj aktivuloj dezirantaj disvastigi Esperanton en sia urbo. HEF volonte havigas ilin al ĉiu interesita, kaj eĉ zorgas pri la transporto kaj konsilas en la muntado kaj aranĝado. Nia sperto estas ke lernejoj, bibliotekoj aŭ kulturcentroj tre volonte akceptas tiajn ekspoziciojn, kaj ili montriĝas tre bonaj iloj por faciligi la informadon. Skribu al info@esperanto.es por koni ĉiujn detalojn.

# Raporto pri la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Madrido de la 20a ĝis la 22a de julio




Sub varmega suno, sed en alloga kongresejo, kie regis vere esperanta etoso, homoj el diversaj regionoj de Hispanio kaj eksterlande, partoprenis la 77-an Hispanan Kongreson de Esperanto, ĉi foje, oni povas diri ke la hispana kongreso estis la komenco de kvar sinsekvaj internaciaj eventoj, t.e. Hispana kaj ILEI (Madrido), UK (Lisbono) kaj IJK (Badajoz). Mi nur raportos pri la unua, ĉar mi certas ke aliaj kongresanoj okupiĝos pri la ceteraj kaj mi kiel hispano devas informi pri mia sperto en la ĉefurbo Madrido, kie mi loĝis dum miaj junaj jaroj.



La universitata residejo (studenthejmo) "Colegio Mayor Teresa de Jesús" estis nia restadejo dum kelkaj tagoj, kun komfortaj ĉambroj kaj bongusta manĝo, kaj tie en diversaj salonoj dediĉitaj ĉi foje al hispanaj Esperanto-pioniroj kaj kompreneble, la ĉefa salono estis dediĉita al Zamenhof, kie oni celebris la oficialan malfermon.

Krom la kutimaj prelegoj, 8 gvidantoj kaj helpantoj montris al la scivoluloj la belecon de la urbo per piedaj ekskursoj tra la historia kaj moderna Madrido. Mi, kiel gvidanto, havis la okazon montri la beletran kvartalon, kiun iamaniere mi ankaŭ malkovris, sed ĉi foje pli profunde, ĉar stari antaŭ la pordo, kie naskiĝis Miguel de Cervantes, aŭtoro de Don Kiĥoto ne estas kutima afero. Ni trairis kelkajn stratojn, kie staras la plej gravaj teatroj kaj teatrejoj de la urbo, kaj iamaniere mi travivis kulturan sperton rememorante tiun tempon. La ceteraj ekskurso tra Madrido estis vere interesaj, mi nur mencias ilin, ĉar mi ne havis tempon partopreni. Temas pri Moderna, Klerisma, Esenca Madrido... gviditaj de volontuloj, kiuj vere konas kaj amas la Historion.

Kompreneble ne mankis distro, kleriga programo, nek kursoj de Esperanto, junulara programo, gufujo / amikujo, ktp.

Estas menciindaj la Inaŭgura prelego de Dennis Keefe "Madrido kaj Movado dum la Movido" Observoj de naiva novbakita Esperantisto en la Madrida Esperanto-Liceo (MEL) de 1980 ĝis 1988". Projekciado de la filmo "Stranga nupto" kun kolokvo de la filma-ĉefrolulo Ángel Arquillos, t.e. mi mem.

IFEF prezentis la venontan kongreson, kiu okazos en la urbo Malago dum la unua semajno de majo 2019, kune kun la Hispana kaj Andaluza, kun allogaj ekskursoj al diversaj urbetoj kaj grandioza ekskurso al Maroko. Oni vojaĝos ŝipe tra la Gibraltara markolo ĝis la urbo Tangero kaj de tie oni vizitos kelkajn historiajn urbojn de Maroko.

La andaluza profesoro Vicente Manzano Arrondo prelegis pri "Senpaga utila esplorado aŭ kiel oni gajni ŝancojn en la Universitato de Sevilo". Ĉi tiu programo tre sukcesas en Sevilo.





Miguel Gutiérrez Adúriz prezentis la kvaran eldonon de la vortaro Hispana-Esperanto, Miguel Fernández prezentis la verkojn: *Ha, Karmela* kaj *Revene*, kaj ne devas forgesi la interesajn poemverkojn far Jorge Camacho *Palestino strangolata* kaj *Brulvunde*
Ana Manero prelegis pri "Maruja Mallo multe pli ol avangarda artistino"

La muzik-grupo "Kaj Tiel Plu", dum la interkona frandvespero vigligis l etoson, invitante al dancado, dum multaj partoprenantoj el diversaj landoj ofertis t ɔajn manĝojn por gustumado en la granda korto de la restadejo.

La dueto "Kajto", kiel ili longe kutimas, okazigis Kant-ateliron kaj instr ıis nin ĝui en esperanto per facilaj vortoj kaj amuzaj kantoj.

Laŭ mi, la plej grava momento estis *Vivu la Teatro* kun partopreno de ıultaj homoj, dancistoj, kantistoj, poetoj el kelkaj landoj: Sudkoreio, Japanio, Nepalo, I Ieksiko, Usono, Kubo, Hispanio...La organizanto de ĉi evento, Miguel Fernández, bel deklamis kaj kantis.

La aŭkcio preskaŭ donacis valorajn librojn kaj objektojn kontraŭ mala a prezo al la plej kuraĝaj, kiuj volis partopreni.

Por fini mian raporton, mi vigligas vin partopreni la sekvajaran Hispan n Kongreson kaj IFEF, okazontaj la unua semajno de majo en la t.n. Urbo de la Paraɑızo (Malago), kie la vetero estas ĉiam agrabla kaj la suno sunas pli ol 350 tagoj de la jaro, tie finiĝas Eŭropo kaj komenciĝas Afriko, kiun ni vizitos dum la postkongreso.

Ángel Arquillos

# KONGRESE EKSPRESE

Pro diversaj familiaj kialoj mi nur povis partopreni en la du komunaj tagoj de la duobla kongreso (hispana kaj ILEIa). Pro tio miaj komentoj estas mallongaj kaj nekompletaj.

Bedaŭrinde mi ne ĉeestis la oficialan malfermon kie oni omaĝis al Esperanto-pioniroj (kelkaj el ili donis la nomojn al la diversaj salonoj de la kongresejo). La akceptejo, en la halo de la Colegio Santa Teresa, estis nomita spaco Ruiz Sierra honore al mia kara Juan Carlos kiu multfoje dum sia esperanta vivo laboregis en similaj lokoj dum la organizado de hispanaj kaj internaciaj kongresoj. Krom eminentaj homoj, aliaj esperantistoj kiujn mi konis en Madrido ankaŭ donis nomon al spacoj kaj salonoj: Redondo, Ada, D-ro Cortezo, Mangada, Figuerola, Herrera, Inglada, ktp.



Dennis Keefe prelegis dum la inaŭguro pri la madrida movado dum la 80aj jaroj, denove kun bedaŭro mi ne ĉeestis sed aliaj partoprenantoj rakontis al mi la emocian resumon de la unuaj jaroj de la historio de Madrida Esperanto-Liceo en la strato Atocha, kie mi esperantiĝis en 1982.

Mia unua programero estis la Ĝenerala Kunveno de HEF kun ne multaj partoprenantoj kaj debato pri la kotizo de junuloj. Mi avertas ke la HEF kunveno dum la HK estas eksterordinara ĉar la memoro de aktivaĵoj kaj la kontoj estas aprobitaj, pro leĝaj ordonoj, en alia kunveno la pasintan monaton junion.

Interesa estis la prezento de la HK de 2019 kune kun la IFEF en Malago. La programo estas interesa kun abundaj ekskursoj inkluzive al Maroko. La ideo de kunigi la HK al alia kongreso estas tre bona kiel oni povis konstati en Madrido.

Rilate al la prelegoj, Vicente Manzano-Arrondo prezentis sian laboron en la Sevilia Universitato riate la lernado de Esperanto, Toño del Barrio parolis pri la urbo Madrido kaj ĝiaj turismaj lokoj, Ana Manero montris la verkoj de Maruja Mallo fama pentistrino de la komenzo de la dudeka jarcento.

Ne mankis prezentado de libroj de la Migueloj, Fernández kaj Adúriz, kaj de Jorge Camacho kaj la libroservo zorgata de Pedro Sanz.

Mia unua kongrestago finiĝis per la interkona frandavespero, tipa programero de la ILEIaj kongresoj kie la kongresanoj portas manĝaĵojn de siaj landoj por komune manĝi. Mi povis gustumi ekde bongustajn svislandajn fromaĝojn ĝis "tekilo" de meksikaj esperantistoj. Ne mankis hispana omeleto kaj sangrio. La festo finiĝis kun la koncerto de Kaj Tiel Plu, kiel ĉiam amuza kaj interesa.

En mia dua tago matene mi partoprenis en la AMO Seminario gvidata de Mireille Grosjean, Dunnan Charters kaj Cecily Lee. Oni debatis pri la esperanta kulturo, la ĉefa temo de la kongreso.

Vespere mi ĉeestis en la Lingva Festivalo, tre amuza programero kie dum kelkaj minutoj kaj profitante ke en la kongreso partoprenas esperantistoj de multaj landoj, oni prezentas diversajn lingvojn kaj iliajn kulturojn (30). Mi aŭskultis pri la portugala, ĉina, okcitana, svahila kaj antikva egipta.

Kaj ĝis ĉi tie mia partopreno ekspresе en la kongreso, mi ne ĉestis en la fermo de la HK kiu okazis post la 22,00... tia estas Hispanio, gesinjoroj.

Lupe Sanz

---

# ILEI KONGRESIS EN MADRIDO

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kongresis en Madrido fine de julio, parte koincide kun la Hispana kongreso. Fakte, la programeroj de la sabata vespero kaj de la dimanĉo, pri kiuj vi povas legi en apartaj artikoloj, estis komunaj kun la Hispana programo.



La fina nombro de ĉeestintoj en la kongresoj estis: nur al hispana kongreso, 164; al ILEI-kongreso, 187; entute (ĉu al unu, al alia aŭ al ambaŭ), 231. Fakte aliĝis 260 homoj, sed pro diversaj kaŭzoj (personaj aŭ manko de permesoj), 30 el ili ne povis fine ĉeesti.

Granda parto de la kongreso de ILEI estis dediĉita al organizaj kunsidoj kaj debatoj de la anoj kaj estraranoj de la asocio. Oni renovigis ties estraron, kun la reelekto de Mireille Grosjean kiel prezidanto. Estis debatita la estonto de la revuo "Juna Amiko", por lernantoj kaj komencantoj, oni nomumis novajn honorajn membrojn, oni debatis pri la stato de la sekcioj.

Plej grave por niaj legantoj, kunvenis membroj de la hispana ILEI-sekcio, por interŝanĝi spertojn, plani estonton kaj trovi manierojn plibonigi la instruadon de Esperanto. Oni esperas ke la instruistoj de Esperanto en diversaj lokoj de la lando povu kontakti la sekcion por ĝin fortigi.

La inaŭguro de la ILEI-kongreso okazis la lundon matene en la aŭditorio de la Universitato UNED, alnomata "Salono Zamenhof", kun prezidado de la vicrektorino Esther Souto kaj ĉeesto de la urbkonsilantino-prezidanto de la distrikto Moncloa, Montserrat Galcerán, de la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill, kaj de la prezidantoj de ILEI, HEF kaj MEL. La inaŭguran prelegon, pri la instrua modelo de UNED, faris en Esperanto ties docento Manuel Pancorbo.

La temo de la kongreso estis "la kultura heredaĵo de Esperanto", enkadrigita en la Eŭropa Jaro pri Kultura Heredaĵo, kies specialan logon la kongreso povis utiligi per rajtigo de la hispana Ministerio pri Kulturo. Tiu temo estis la centro de specifa Seminario, je universitata nivelo, kiu disvolviĝis dum la du lastaj tagoj de la kongreso.

Multaj aliaj prelegoj sinsekvis en tiu semajno, pri diversaj temoj, multaj ligitaj al edukado, sed ne nur. Pluraj el ili enkadriĝis en AMo-seminario (seminario pri aktivula maturiĝo), sponsorita de UEA.

Ne mankis ankaŭ kulturaj programeroj, kiel la Nacia Vespero, kun partopreno de anoj de la plektrorkestro "Calle del Barquillo", en kiu partoprenas nia amiko Miguel Fernández, kaj de flamenka grupo, kiuj multe entuziasmigis la vizitantojn. Ankaŭ la Internacia Vespero, en kiu diversaj kongresanoj montris la kulturon de siaj respektivaj landoj. Ankaŭ partoprenigis la kongresanojn nova eldono de la kolektiva spektaklo, "Vivu la teatro!", ankaŭ gvidita de Miguel Fernández, kun kunlaboro de Ana Manero.



La kongresanoj povis ĝui riĉan turisman programon, kun pluraj ekskursoj en Madrido, laŭ specialaj temoj, gvidataj de lokaj samideanoj, kaj ankaŭ vizitoj al proksimaj konstruaĵoj. Estis organizitaj vizitoj ankaŭ al la urboj Alcalá de Henares, Segovio kaj Toledo.

La venonta kongreso de ILEI okazos en la urbo Ĉaĉak, en Serbio, en julio 2019.

# . LA 103-a UNIVERSALA KONGRESO EN LISBONO 28.7. - 4.8. 2018

Unuafoje la Universala Kongreso okazis en Portugalio, en ties ĉefurbo Lisbono. Al la ĉi-jara evento aliĝis 2 562 geesperantistoj el 75 landoj. Ne eblis pretervidi grandegan emblemon sur la muro de la rektorejo.

Diversaj programeroj okazis en tri diversaj lokoj. La ĉefa kongresejo estis en la fakultato pri juro de la lisbona universitato. En la rektorejo situanta en proksimego (trans la strato) okazis artaj aranĝoj kaj solena fermo de la kongreso.

La inaŭguro kaj la nacia vespero okazis en la salono de koncertoj proksime al la antikva urbocentro je distanco de 4 km for de la kongresejo. Temas pri teatro fondita en la jaro 1890. La inaŭguron ĉeestis ambasadoroj el Litovio, Pollando kaj Slovakio. Krom kutimaj bonvenigaj salutvortoj de la prezidanto de UEA Mark Fettes, de unuopaj landaj reprezentantoj kaj de aliaj gastoj, estis legita salutmesaĝo de Audrey Azoulay, ĝenerala direktorino de Unesko. Festparolis ankaŭ la pranepino de L.L. Zamenhof s-ino Margareta Zaleski Zamenhof. La bankedo kaj la balo okazis en la kultura centro de la kvartalo Belém, 10 km for de la kongresejo.

Post la alveno de la kongresanoj, la sabata vespero estis dediĉita al la Movada Foiro, kie diversaj E-asocioj povis ekspozicii siajn objektojn kaj varbi al siaj renkontiĝoj kaj aliaj aktivaĵoj. Ĉi-foje la loko ne estis tre taŭga por tiu celo. Malmulte da spaco kaj



varmegeco en la halo ne faciligis kontakton kun la ekspoziciantoj.



La kongresa temo estis "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?" Kiel kutime, la kongresaj programeroj estis superŝarĝitaj je diversaj prelegoj kaj diskutoj kaj ne eblas en unu paĝo priskribi ĉiujn. Komitatkunsidoj, forumoj, akademio de Esperanto, diskutoj pri la kongresa temo, fakaj kunsidoj, belartaj konkursoj, aŭtoraj duonhoroj, junulara konkurso pri publika parolado, libroj de la jaro, legantoj de Esperanto, CO respondas, paroligaj lecionoj, KER-ekzamenoj, prezento de diversaj movadoj, aŭkcio kaj artaj aranĝoj estas nepraj dumkongresaj programeroj. Al tio aldoniĝis multaj aliaj interesaj prelegoj kaj atelieroj. Okazis prelegoj pri Portugalio, pri botanikaj specioj, pri mitaj historioj, pri renovigebla energio, pri lisbonaj tramoj, pri malsameco de la lingvo en Brazilo kaj en Portugalio, eblis sekvi portugalan lingvokurson. Oni parolis pri perspektivoj por la Eŭropa Unio, pri sukcesoj kaj perspektivoj en planedoscienco. La kongresa kuriero TAĴO NIA informis pri ĉiutagaj okazaĵoj.




Riĉa estis la propono al diversaj ekskursoj. Okazis antaŭkongresaj kaj postkongresaj ekskursoj. Tiamaniere esperantistoj povis ekkoni plurajn urbojn kaj belajn lokojn en Portugalio. La vojo de Lisbono al Porto estis parfumita per eŭkaliptaj arbaroj. Ĉiutagaj ekskursoj ebligis promenadon en la urbo. Esperantistoj videbligis sin per kongressakoj.

La plej ŝatata merkreda ekskurso direktiĝis al Sintra. La oferto de UEA estis rapide elĉerpita. Tamen al tiu loko alvenis pluraj individuaj grupetoj aŭ soluloj. Sintra situas proksime al Lisbono en la nacia parko Serra de Sintra. Tie en verdaj montetoj aperas pluraj vidindaj kasteloj kaj palacoj kun eksterordinara arkitekturo kaj belegaj ĝardenoj

Granda plezuro kaj neforgesebla sperto por kelkaj partoprenantoj estis flugado per balono. Por tio necesis vekiĝi frumatene. Aprezata estis tre malmulte kosta manĝaĵo en la universitata restoracio kun afabla servistaro. Varmis en Lisbono kaj la temperaturo tiutempe altiĝis ĝis pli ol 40 gradoj en la tuta Iberia duoninsulo. Ne mirinde, ke la esperantista piedpilk-teamo malvenkis kontraŭ spertaj lokuloj je 1: 7.

Dum la kunveno pri venontaj kongresoj prezentiĝis Lahtio (Finnlando) por la jaro 2019 kaj Montrealo (Kanado) por la jaro 2020. Kutimaj klerigaj lundaj programeroj pro intereso rapide plenigis la koncernatajn salonojn. Dum la tuta kongresdaŭro ni kleriĝis en prelegoj de IKU, ISAE, AIS kaj aliaj. Malfacila estis la elekto inter tiom da programeroj.

Ĉi-jara UK estis riĉa kaj varia laŭprograme, ĉiu povis trovi por si ion interesan. Okazis diversaj fakaj kunsidoj kaj allogaj prezentadoj, ekspozicioj, muzikaj posttagmezoj, spontanea gitarludado kaj kantado en la koridoro kaj vesperaj koncertoj kun famkonataj esperantisto-artistoj. Ĉe la fino la infanoj de la kongreseto venis saluti nin.

Unuvorte, la kongreso estis ĝuinda kaj necesas danki al la organizantoj kaj al iliaj kun-




helpantoj pro ĝia sukceso.

*Liba Gabalda*

# LA IJK AŬ KIEL ANTAŬENPUŜI NIAN MOVADON


La somera feriumado dum 2018 jam restas kiel parto de la historio. Somero kutime estas tre aktiva rilate al nia movado, kaj ĉijare ĝi estis ege grava por ĝi en la Iberia duoninsulo. Ni havis la bonŝancon gastigi, sude de la Pirineoj kaj inter la Mediteraneo kaj la Atlantiko, tri internaciajn kongresojn (la ILEI-kongreso, la UK kaj la IJK); du el ili estas la du plej grandaj en Esperantujo.

Mi persone respondecis pri la IJK. Nun mi povus multe ekrakonti pri la bunta programo, la varma etoso, la diverseco de partoprenintoj... sed mi tion jam plurfoje faris. La junaj esperantistoj ne bezonas multe por ĝui eventon; sufiĉas ke ĉeestas granda kvanto de junuloj ĉar en tia aĝo oni kutime facile adaptiĝas al la kondiĉoj kaj ne tre zorgas pri la programo. Tial nun mi kredas ke estas la momento paroli pri, laŭ mi, la veraj grandaj sukcesoj de la IJK. Laŭ mi ili ĉefe estis du: la eksteraj rilatoj kaj la plifortigo de nia movado.

En la Hispana Kongreso en Terŭelo, mi estis surprizita kiam iu aperis kun ĵurnalo en kiu oni dediĉis du enajn paĝojn al la Kongreso mem kaj la lasta paĝo estis tute en Esperanto. Tion mi revis. Tial mi klopodis ke ĉiuj homoj en la urbo kaj regiono aŭskultu pri ni. Vere malfacilis sed danke al la kunlaboro de homoj kiel Andi Plaza kaj Juan Diego Díaz Bautista, ni atingis aperi plurfoje en lokaj kaj regionaj ĵurnaloj, radio kaj televido kaj ankaŭ hispannivele en El País, esRadio, eldiario.es kaj la COPE. Eble kelkaj serĉos informon aŭ lernos Esperanton pro tio, sed sendube multaj scias ke nia lingvo kaj komunumo estas viva kaj aktuala.

Sed la eksteraj rilatoj ne estas nur reklamado. Oni ankaŭ devas zorgi pri la rilatoj kun la asocioj kaj institucioj. Tial mi inkludis eventojn kun la konsilio de la junularo el Ekstremaduro, debato kun politikaj partioj, programero kun asocioj, kunlaboris kun la urbo... Nun la anoj de tiuj asocioj kaj institucioj estos niaj ambasadoroj ĉiam kiam iu parolos pri lingvoj; kiam ni alproksimiĝos al ili denove, neniu hezitos labori kun ni.




William Guerrero prezidanto de HEJS

Mi ne plu loĝas en Hispanio sed en Germanio ekde antaŭ preskaŭ du jaroj. Tamen tio ne estis problemo kaj por Miguel Gutiérrez Adúriz kaj por Toño del Barrio instigi min partopreni la hispanan movadon. Nun vidu al kio mi dediĉis mian tempon. Mi vidis ke fakte estis necese fortigi la junan movadon hispanie. Tiam la kataluna movado ŝajnis forta sed bedaŭrinde tio ŝanĝiĝis pro la naturo mem de la juneco. Nun mi rigardas aliel al ĝi. Ni havas novan viglan kaj aktivan HEJS. La nova Prezidanto William estas espero por mi, ĉefe ĉar ĝi ne solas. Dum la IJK partoprenis pluraj hispanoj. Ekde komencantoj ĝis denaskuloj kaj kokrodilemo okazis. Kiuj konas min scias ke mi ne apartenas al tia grupo. Tamen tio utilegis ĉar tial la hispanoj komencis krei grupon. Nun ili ne estas nur uzantoj en iu komuna grupo en sociaj retoj aŭ babilejo; ili estas konatuloj eĉ amikoj. Ili spertis semajnon kune, kunhavis ideojn, pensis planojn por renkontiĝi denove... Tio estas la estonteco. La nova teamo konvinkos pliajn esperontistojn, kiuj montros la vivecon de nia lingvo ene kaj ekster la landlimojn de Iberio. Ju pli da junuloj des pli da espero.

En la internacia nivelo, la 74-a IJK en Badajoz atingis realveni al la supero de la simbola limo de 300 aliĝintoj, kiuj venis el ĉiu kontinento. La venontjara IJK en Slovakio ŝajnas eĉ pli sukcesa. La teamo estas tiom bona kaj laborema, havas tiom da antaŭpreparo, rimedoj kaj kontaktoj ke mi kredas ke ni povus eĉ atingi 500 aliĝintojn. Tio kune kun TEJO kiu havas pli stabilan strukturon montras al ni horizonton de sukcesoj.

Nun al nia juna movado nur restas du aferoj: unue revi por havi altajn celojn kaj due helpi kaj kunlabori por realigi tiujn planojn.

Carlos Pesquera

# HISPANOJ OMAĜITAJ ĈE UEA



Dum la Universala Kongreso de Lisbono, oni anoncis la nomumon de tri novaj Honoraj Membroj de Universala Esperanto-Kongreso, el kiuj du venis el Hispanio: la iama prezidantino de HEF, Rafaela Urueña, kaj la kataluna aktivulo Josep Franquesa, prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio. Jen iliaj biografio, laŭ la oficiala komuniko de UEA:

**María Rafaela URUEÑA ALVAREZ** (n. 1942 en Bilbao, Hispanio) estas fakulo pri internacia juro kaj gvida aktivulo en la loka, landa kaj internacia Esperanto-movadoj. Juron ŝi studis en la Universitato de Valladolid, kie ŝi atingis "eksterordinaran premion" okaze de la diplomiĝo. En 1979 ŝi doktoriĝis pri juro, kaj ekde 1986 laboris kiel profesorino pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Valladolid, ĝis sia emeritiĝo. Dum 11 jaroj ŝi gvidis kursojn pri Naturjuro kaj Internacia Juro en la Nacia Universitato de Neĉeesta Lernado UNED, en la hispana urbo Palencio. Ŝi estas membro de la Katedro "Jean Monnet" pri Eŭropa Juro, kaj fondinta membro de la Instituto por Eŭropaj Studoj en la Universitato de Valladolid.

Prof. Urueña ofte prelegis pri juraj temoj en la kadro de Internacia Kongresa Universitato dum la Universalaj Kongresoj; ŝi estis krome la Rektorino de IKU dum la UK en Valencio, 1993. Aŭtoro de multaj libroj kaj artikoloj en la hispana. i.a. pri medioprotektado kaj juro de la maro, ŝi publikigis krome la E-librojn *ABC de la Eŭropa Unio: Enkonduko en la eŭropan juron* (1997) kaj *Eŭropa Unio, paŝon post paŝo* (2014). En 2016 aperis ŝia enkonduka eseo en la libreto eldonita de UEA kun pluraj internaciaj traktatoj, Fundamento de la Homaj Rajtoj. Ŝi estas la Honora Prezidanto de la UEA-laborgrupo "Esperanto por UN", kaj dumviva asociita membro de AIS San Marino. Post la refondo de internacia faka asocio pri juro (post la forpaso de d-ro Ivo Lapenna), ŝi estis prezidanto de Jura Esperanto-Asocio (EJA) ekde 1991 ĝis 1995, kaj denove kun la sama posteno ekde 2010 ĝis 2015. Nun ŝi estas Sekretario de Internacia Jurista Esperanta Asocio (IJEA).

Dumviva membro de UEA kaj regula membro de Societo Zamenhof, prof. Unueña signife kontribuis ankaŭ al la loka kaj landa movadoj jam ekde la jaro 1960. Dum pluraj jaroj ŝi gvidis kurson pri Esperanto per "Radio Valladolid", kaj de 1978 ĝis 1984 ŝi estis Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. En 1998 ŝi estis la prezidanto de la loka kongresa komitato por la hispana kongreso en Valladolid. En 2010 ŝi ricevis la premion Ada Fighiera Sikorska de la kataluna Kultura Asocio Esperantista, rekone al ŝiaj multaj kontribuoj enlande kaj internacie.

**Josep FRANQUESA i SOLÉ** (n. 1937 en Sant Feliu de Codines, Katalunio, Hispanio) eklernis Esperanton kiel adoleskulo en sia naskiĝvilaĝo. Post la jaroj de deviga lernejo, en la urbo Lleida li disvolvis longas karieron kiel komercisto, unue sur la kampo de kokinbredado, poste rilate al varoj por aŭto-riparado kaj hidraŭlikaj ekipaĵoj. En tiu pangajna laboro li ofte kaj kreeme uzis Esperanton por fari internaciajn kontaktojn, starigi komercajn rilatojn, kaj ekscii pri novaj sciencaj kaj teknikaj evoluoj. Pri tiu duona jarcento de sukcesa utiligo de la lingvo li verkis elokvente en la eseo "Malgranda estas bela, grava kaj interesa" (Malgranda estas bela: Prelegaro de la 31a Kataluna kaj 4a Transpirenea Kongreso de Esperanto, 2003). Liaj multnombraj internaciaj amikecoj kaj lia entuziasmo por tiu konkreta per-Esperanta agado restas tre konvinkaj pruvoj de ĝia valoro, ankaŭ por la novaj generacioj de esperantistoj.

Ne estas surprize, ke tiu dumviva praktika rilato al Esperanto esprimiĝis ankaŭ per multjara membreco en UEA, ekde 1982 ankaŭ kiel regula membro de Societo Zamenhof, kaj per partopreno en kvardeko da Universalaj Kongresoj. Lia sukcesa komerca agado instigis lin aktiviĝi, ekde 1996, en la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), aliĝinta faka asocio de UEA. En la sama periodo li fariĝis C-komitatano de UEA, restante ĉe tiu posteno de 1995 ĝis 2001 kaj denove de 2004 ĝis 2013 – entute 15 jarojn.

Ĉe la landa nivelo, Josep Franquesa kontribuis longe kaj diversmaniere al la kataluna kaj hispana movadoj, interalie kiel prezidanto de la lokaj kongresaj komitatoj en la hispana kaj kataluna kongresoj en Lleida en 1975, respektive 1986. Ekde la 90-aj jaroj li rolis dum diversaj mandatoj kiel prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio, foje interŝanĝante la postenon kun tiu de vicprezidanto. Ne malplej notinde, lia filino kaj almenaŭ du el liaj nepoj aktive parolas Esperanton.


La tria honorigito estis **Sudo NAN Youli**, multflanka aktivulo el Ĉinio.

Krome, en la ferma ceremonio de la kongreso oni disdonis 8 diplomojn pri Elstara Agado, el kiuj unu estis aljuĝita al la nuna prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio.

# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## Andaluzio

Malago




Aperis la Tria poemaro, eldonita de Andaluzia Esperanto Unuiĝo, verkita de Ángel Arquillos, titolita *La Fonto de l´sorto*.

Temas pri serio de poemoj laŭ alfabeta ordo pri diversaj temoj, ĉefe pri amo, sed ankaŭ pri fantazio aŭ ĉagreno. Nur 65 paĝoj sufiĉas por malkovri la fontano de l´sorto kie vi povs legi poemetojn kiel:

"Ĉu restas rempon al mi? / Mi nur bezonas momenton / apud vi…

Se vi konsentas kun mi, / ni reprenas la direkton / de la viv'

Mi tre solas for de vi / kaj mi bezonas konekton… / Sufiĉas eta momento.

### KUNSIDO ĈE LA ASOCIO AMIGOS DEL FERROCARRIL DE MALAGO



La 15.an de septembro, sabate, kelkaj membroj de la LKK de la venonta IFEF kaj HEK kongresoj, okazontaj en la urbo Malago, kunsidis ĉe la Asocio Amigos del Ferrocaríl de Malago por informi pri la evento kaj la ekskursojn organizotaj kune kun ĉi Asocio, kiuj ankaŭ planas muntadon de ekspozicio pri fervojoj en la Dioceza Domo.




La 22-an de septembro, membroj de la LKK de la venontaj IFEF Kongreso la Hispana kaj la Andaluzia, okazontaj en majo de 2019 kaj ĉe la sama kongresejo, kunsidis ĉe la kafejo Esperanto de la urbo Malago kun la celo ordigi la programeron, alporti novajn ideojn kaj precipe la plurajn ekskursojn gvidotaj de profesiuloj kaj volontuloj de nia Asocio en Andaluzio. Ni jam havas ĝeneralan ideon pri eblaj prelegoj kaj muzikgrupoj, tipaj andaluzaj danco-grupoj, flamenko, interalie. De ĉi-tie mi vigligas la homojn, kiuj pretas aliĝi, ne prokrasti multe, ĉar la Kongresejo (kun limigitaj ĉambroj), estas restadejo por la plimulto kaj valoras la penon tranokti en tiu alloga restadejo, stariganta sur monteto kie ni spertos pli ol unu semajnon en internacia etoso, spirante sanan aeron.

## Sevilo

### Sevila universitata kurso de Esperanto



Ekis la Sevila E-universitata kurso 2018/19. Ĉi jare demarŝita far S-ano Guillermo Molleda de la Facultad de Finanzas y Turismo, kie okazis la unua klaso, la 25-an de septembro. La kurso disvolviĝos unu tagon semajne en du seancoj plus ret-kurso. Por universitatanoj ĝi ebligos 6 poentojn el universitaj kreditoj plus la ebleco atingi la nivelon B1 en onta ekzameno, kiel okazis la pasintan ernojaron. La limdata aliĝo permesos havi baldaŭ pli da E-lingvaj amantoj al kiuj la instruantaro deziras plejan sukceson.

# NEKROLOGOJ

**TRINI GARCÍA**

La 21-an de aŭgusto forpasis la konata aktivulino Trinitat García Cobacho, en la urbo Sant Cugat del Vallés. Ŝi estis 99-jaraĝa.

Kune kun sia edzo, Josep Colom, mem forpasinta pasintjare (vidu Boletín 418, kie aperas foto de ambaŭ), ŝi estis la animo de la "Esperanto-grupo Jozefo Anglés", nomata honore al ŝia iama kompano kaj instruisto. Ili organizis aŭ kunlaboris en multnombraj renkontiĝoj kaj kongresoj.

Ambaŭ ricevis la premion Ada Fighiera-Sikorska, dum la 22-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo, en 2014.

**ÁNGEL MAÑERO**

La 25-an de julio forpasis Ángel Mañero González. Li estis unu el niaj plej veteranaj membroj, interalie helpinto en la pretigado de la historia vortaro de Vicente Tudela.
Li estis ofta partoprenanto en la agadoj de la grupo en Valencio. Li kutime aliĝis al la hispanaj kongresoj, eĉ dum la lastaj jaroj, en kiuj li ne povis partopreni persone, sed aliĝis kiel solidara helpo, kaj ŝatis ricevi la kongreslibron kaj ceteran materialon. Li fakte forpasis tuj post la fino de la hispana kongreso en Madrido, kie li havis la numeron 54, kaj ni havis la ŝancon rememori lian nomon dum la fermo de la ILEI-kongreson.

**VICENTE GARCÉS**

En marto de 2018 forpasis José Vicente Garcés. Iom surprize li suferis ian koratakon kaj post operacio restis en hospitalo. Teorie, la evoluo ne estis grava sed poste oni indikis, ke li mortis pro alia koratako.

Li ne estis maljuna sed apartenis al E-movado de antaŭ multe da tempo.

Kiel junulo li agadis en JESA (Junulara Esperantista Societo Aragona), iama aragona sekcio de HEJS.

Dum multaj jaroj li estis membro de FRATECO, kies prezidento estis en jaro 2000 dum ne multe da tempo.

Li partoprenis plurajn E-Kongresojn. Ekzemple, UK en Kubo kaj Valencio, kaj laste, la HEK en 2017, en Teruelo.

**NI KONDOLENCAS ILIAJN FAMILIANOJN KAJ AMIKOJN**




**ALIĜILO**
por la **71-a kongreso de IFEF**
03-a ĝis 09-a de majo 2019
**Malago, Hispanio**

ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aliĝilon al retadresoj:
**ifef2019@esperanto-andalucia.info**
**marilo1950@hotmail.es**

**LKK- adreso:**
Andaluzia Esperanto Unuiĝo
strato Ánfora, 6-5º D, 29013-Malago (Hispanio)
**Kongresa ret-paĝo:** https://esperanto-andalucia.info

| Familia nomo | Persona nomo |
|---|---|
| | |

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Adreso | | | | |
| Telefono: | **Ret-adreso:** | | | |
| IFEF-ano | jes | ne | viro | virino (forigu ne taŭgajn) |
| **Mi antaŭpagas jenan sumon :** | **Eŭro** | | | |
| Per: ĝiro IBAN: ES57 2038 9814 83 6000595212 SWIFT/BIC: CAHMESMM | | | | |

| **Kongreskotizo en Eŭro** | **Ĝis 31.12.2018** | **Poste** | Sumo |
|---|---|---|---|
| IFEF-membro | 60 | 80 | |
| IFEF-membro loĝanta en B-landoj, laŭ UEA-difino<br>Familiano; junulo ĝis 30 jaroj | 30 | 40 | |
| Ne IFEF-membro | 80 | 100 | |
| Familiano de ne IFEF-membro | 40 | 50 | |
| Ĉambro-perado po persono | 5 | 5 | |
| **V1:** Urbovizitado – **Malago** (piedire) | 3 | 3 | |
| **V2:** Urbovizitado – **Malago, Botanika ĝardeno**, per buso | 8 | 8 | |
| **D1:** Duontaga ekskurso: **Zafarraya**, kun faka vizito | 15 | 15 | |
| **D2:** Duontaga ekskurso: **Antequera** | 12 | 12 | |
| **T1:** Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): **Ronda** (*) | 25 | 25 | |
| **T2:** Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): **Kordovo** (*) | 30 | 30 | |
| **T3:** Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): **Granado** (*) | 42 | 42 | |
| Tranoktado laŭ elekto (minimume unu nokto) | | | |
| **Je aliĝo devas pagi: kongreskotizon, ĉambroperadon kaj tranoktadon laŭ elekto por minimume unu nokto.** (+50% postkongreso kaze de ĝia rezervo)<br>**Signu la elektitajn servojn** | | | |
| Pagita sumo : | | | |
| Restanta pago : | | | |
| **Postkongreso: Norda Maroko** | unulita | dulita | |
| Vendredo, 10.05 Malaga-Algeciras-Ceuta-Tetuan | 255 | 225 | |
| Sabato, 11.05 Tetuan-Asilah-Tanger-Tetuan | | | |
| Dimanĉo , 12.05 Tetuan-Chaouen-Ceuta-Malaga | | | |

(*) Pikniko inkluzivita kaze de kompleta pensiono, alie devas esti aparte mendita. Paĝo 1/2




# ALIĜILO por la
**78-a Hispana Esperanto-kongreso**
01-a ĝis 05-a de majo 2019
**Malago, Hispanio**

ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aliĝilon al retadresoj:
**ifef2019@esperanto-andalucia.info**
**marilo1950@hotmail.es**

**LKK- adreso:**
Andaluzia Esperanto Unuiĝo
strato Ánfora, 6-5º D, 29013-Malago (Hispanio)
**Kongresa ret-paĝo:** https://esperanto-andalucia.info

| Familia nomo | Persona nomo |
|---|---|
| | |

| |
|---|
| Adreso |
| Telefono: **Ret-adreso:** |
| HEF-AEU-ano : jes ne viro virino (forigu ne taŭgajn) |
| **Mi antaŭpagas jenan sumon : Eŭro** |
| Per: ĝiro IBAN: ES57 2038 9814 83 6000595212 SWIFT/BIC: CAHMESMM |

| **Kotizoj en Eŭro** | **Ĝis 31.12.18** | **Poste** | Sumo |
|---|---|---|---|
| A) HEF aŭ AEU-membro | 35 | 55 | |
| B) Ne membro | 50 | 65 | |
| C) Juna (1) membro de HEF, AEU kaj familiano | 20 | 35 | |
| D) Juna (1) nemembro, familiano | 25 | 45 | |
| E) Infano kaj studento ĝis 24 jaraĝa | 5 | 5 | |
| Ĉambro-perado po persono | 5 | 5 | |
| **V1:** Urbovizitado – **Malago** (piedire) | 3 | 3 | |
| **V2:** Urbovizitado – **Malago, Botanika ĝardeno**, per buso | 8 | 8 | |
| **D1:** Duontaga ekskurso: **Zafarraya**, kun faka vizito | 15 | 15 | |
| **D2:** Duontaga ekskurso: **Antequera** | 12 | 12 | |
| **T1:** Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): **Ronda** (*) | 25 | 25 | |
| **T2:** Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): **Kordovo** (*) | 30 | 30 | |
| **A1:** Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): **Granado** (*) | 42 | 42 | |
| Tranoktado laŭ ĉambro mendilo (minimume unu nokto) | | | |
| Aldonaj noktoj post la 5-a de majo (5€/nokte) | | | |
| **Postkongreso: Norda Maroko** (**) | unulita ĉ. | dulita ĉ. | |
| Vendredo, 10.05 Malaga-Algeciras-Ceuta-Tetuan | 255 | 225 | |
| Sabato, 11.05 Tetuan-Asilah-Tanger-Tetuan | | | |
| Dimanĉo , 12.05 Tetuan-Chaouen-Ceuta-Malaga | | | |

**Je aliĝo devas pagi: kongreskotizon, ĉambroperadon kaj tranoktadon laŭ elekto por minimume unu nokto.** (+50% postkongreso kaze de ĝia rezervo). (**) Prioritaton por postkongreso havas la IFEF-kongresanoj. **Signu la elektitajn servojn**

| | |
|---|---|
| Entute : | |
| Pagita sumo : | |
| Restanta pago : | |

(*) Pikniko inkluzivita kaze de kompleta pensiono, alie devas esti aparte mendita.

# Ĉambro mendilo

*Bonvolu skribi la nomo/jn de la kunloĝanto/j, kaze de plurlita ĉambro; se ne, vi pagos la prezon por unulita ĉambro. LKK ne okupiĝas pri serĉi kunloĝanton.*

Mi loĝos kun:
Mi mendas la jenajn noktojn (bonvolu signi).
La prezoj estas en Eŭro, por unu nokto kaj unu persono.

| Noktoj. | 01/02 | 02/03 | 03/04 | 04/05 | 05/06 | 06/07 | 07/08 | 08/09 | 09/10 | 10/11 | 11/12 | 12/13 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | | | | |

| Malago – La Casa Diocesana (Domo Dioĉeza) | | |
|---|---|---|
| unulita ĉambro, kun matenmanĝo | 34 € | |
| unulita ĉambro, kun duona pensiono | 42 € | |
| unulita ĉambro, kun kompleta pensiono | 53 € | |
| 1 lito en dulita ĉambro, kun matenmanĝo | 28 € | |
| 1 lito en dulita ĉambro, kun duonpensiono | 38 € | |
| 1 lito en dulita ĉambro, kun kompleta pensiono | 47 € | |

Pagmanieroj:
Internacia ĝiro en eŭroj al: Asociación Andaluza de Esperanto
BANKIA
IBAN: ES57 2038 9814 83 6000595212
SWIFT/BIC: CAHMESMM

Ĝeneralaj instrukcioj

1. Sendu la pagon al la indikitaj banko-kontoj de la LKK. Oni traktos la aliĝon nur post alveno de la pago.
2. Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon, menciu precizajn informojn pri la koncerna persono: nomo, lando, kompleta adreso.
3. Kongres-kotizo neniukaze estas repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon ĝis la 31-a de marto antaŭ kongreso.
4. Post la ricevo de la koncerna pago, LKK konfirmos per Konfirmilo la akcepton de ĉiu aliĝilo, per indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
5. LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn pro alta inflacio aŭ se aliaj neantaŭvideblaj kondiĉoj postulos tion.

Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aliĝilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san- kaj akcident-asekuron por mia restadperiodo en Andaluzio, en Hispanio, dum la 71-a IFEF Kongreso kaj Postkongreso en Norda Maroko.
Mi konsentas (ne konsentas), ke mia retadreso estu skribita en la kongresa libro (forigu ne taŭgan).

Loko, dato: Subskribo:

## Provizora PROGRAMO de la HEF kaj 71-a IFEF kongresoj

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo 01.05** | 10.00 - | Akceptado / Informado: alvena tago por HEF<br>HEF-distra programo, prelegoj |
| **Jaŭdo 02.05** | 10.00 – | HEF-turisma programo - Granado |
| **Vendredo 03.05** | 10.00 –<br><br>20.00 – 21.00<br>21.00 – | Akceptado / Informado: alvena tago por IFEF<br>HEF-kultura programo<br>Kunveno de la IFEF Estraro kaj LKK<br>Interkona vespero (Internacia gustumado, kun prezentado) |
| **Sabato 04.05** | 08.00 – 10.00<br>10.00 – 12.00<br>12.00 – 12.30<br><br>14.00 – 15.00<br>15.00 – 19.00<br><br>20.30 – | Akceptado/Informado<br>Solena Malfermo (komuna: HEF kun IFEF)<br>Komuna foto, Gazetara konferenco<br>*Tagmanĝo*<br>Prelego pri la urbo, regiono<br>Urbovizitado V1 - Malago (piedire kaj per urba buso)<br>*Vespermanĝo*<br>Nacia vespero: “Flamenco” |
| **Dimanĉo 05.05** | 09.00 – 10.00<br>10.00 – 13.00<br><br>10.00 – 13.00<br>10.00 – 13.00<br><br>15.00 – 19.00<br><br><br>20.30 – | Venonta kongreso IFEF sinprezentas<br>IFEF - Nepublika komitatkunsido<br>E-kursoj por komencantoj; -intoj<br>Urbovizitado V2 - Malago, botanika ĝardeno (per urba buso)<br>HEF - Ĝenerala kunsido<br>*tagmanĝo*<br>Kunsido de la Faka Komisiono de IFEF<br>HEF-programo (prelego, spektaklo)<br>*vespermanĝo*<br>Prelego pri Astronomio (interplaneda spac-veturado) - Carlos Spinola |
| **Lundo 06.05** | 09.30 – 12.30<br>09.30 – 12.30<br><br>14.30 – 19.30<br><br>14.30 – 19.30<br><br>21.00 – | Plenkunsido<br>E-kursoj por komencantoj; -intoj<br>*tagagmanĝo*<br>Duontaga ekskurso D1 – Zafarraya, laŭ la spuroj de antikva trajno; maksimume 60 personoj<br>Duontaga ekskurso D2 – Antequera<br>*vespermanĝo*<br>Kultura vespero |
| **Mardo 07.05** | 09.30 – 12.30<br>09.30 – 12.30<br><br>15.00 – 17.00<br>17.00 – 18.00<br>18.00 – 19.00<br><br><br>20.30 –<br>21.30 – | Ĉefa fakprelego kaj aliaj prelegoj; 110a jariĝo de IFEF<br>E-kursoj por komencantoj; -intoj<br>*tagmanĝo*<br>Movadaj aferoj; Kunsido de la laborgrupoj, publika<br>Ateliero pri arkivado - Manlibro de Jan Niemann<br>Ateliero pri informadiko (kiel krei Vikipedian paĝon) - Laurent Vignaud<br>*vespermanĝo*<br>Distra vespero<br>Kunveno de la IFEF estraro kaj LKK ; Estrarkunsido de IFEF |

| | | |
|---|---|---|
| Merkredo<br>08.05 | 09.30 – 19.30<br><br>21.00 – 22.00<br>22.00 – | T1 - Trajna ekskurso al Ronda; kun tagmanĝo (pikniko)<br>*vespermanĝo*<br>Solena fermo<br>Ĝisrevida vespero |
| Jaŭdo<br>09.05 | 08.00 – | T2 - Tuttaga ekskurso al Kordovo, Medina Azahara; kun tagmanĝo (pikniko) |

## Postkongreso (10.05-12.05) - Norda Maroko

| | | |
|---|---|---|
| Vendredo,10.05 | | Malaga-Algeciras-Ceuta-Tetuan |
| Sabato,11.05 | | Tetuan-Asilah-Tanger-Tetuan |
| Dimanĉo,12.05 | - 23.30 | Tetuan-Chaouen-Ceuta-Malaga |

ANONCOJ PRI LA FAKPRELEGOJ

Laŭ la programo de la 71-a IFEF-kongreso estos prezentitaj pluraj fakprelegoj.
La resumo de la ĉefa fakprelego estu sendita al Rd ĝis fino de januaro 2019 por aperigi ĝin en nr. 2 de IF, kaj al Gv de la Faka Komisiono ĝis la fino de marto 2019.
La preleg-dezirontoj estas petataj anonci sin kaj prezenti la resumon de la prelegoj al LKK kaj al Gv de FK antaŭ la 31-a de marto 2019.
Faka Komisiono elektos laŭtemajn altkvalitajn prelegojn el diversaj landoj, por ke la ĉeestantoj povu interŝanĝi kaj ĝui la sukcesajn rezultojn pri la fakaj scienc-teknikaj esploroj kaj pri la fervoja evoluo en la mondo.
Bonvolu sendi la prelegojn kun simpla memprezento pri la aŭtoro al la retpoŝta adreso: esperanto@kabelmail.dk

Kiel atingi la kongres-urbon Malago

Aviadile: flughaveno

De flughaveno al kongresejo:

- per buso/j:


- taksie:

Trajne: diversaj trajnoj:

InterCity,

Aŭte:

La loĝejo (kongresejo) situas:



# 26-a INTERNACIA SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO EN SALOU 2018

La mediteranea postsomera vetero akompanis nin dum la 26-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo en la bela mondkonata urbo Salou. La urbestro, Pere Granados, salutis la ĉeestantojn kaj volonte fotiĝis kun la grupo (pli ol cent homoj).

De la komenco ĝis la fino, la evento disvolviĝis kun granda sukceso kun homoj el 12 landoj. Ĉi jare ĉeestis 6 homoj el Islando, kiuj tre ĝuis la hispanan eventon, okazonta venontjare en Andaluzio, plejeble en la ĉemara urbeto Torrox, kies vetero onidire estas la plej agrabla en Eŭropo kaj hazarde, unu el ties ĉefaj stratoj nomiĝas Avenida de Esperanto, inaŭgurita antaŭ pli ol 30 jaroj.  Do, ni atendu la tempopason, kaj se oni ne trovas pli bonan lokon, la afero pri la kongresurbo jam estus solvita.

La kvarstela hotelo kun mirindaj vidoj kaj ege komfortaj ĉambroj kaj bongusta kaj abunda manĝo, meritas aplaŭdon, ĉar krome ni havis je nia dispono grandegan apartan salonon por organizi ĉiujn esperantajn momentojn: prelegoj, ŝpritaĵoj, prezentado de libroj, maratono de poezio, interesa libroservo, belega naĝejo, gustumado de la fama kataluna "cava" kaj malaga vino, kaj ne mankis kukoj, sekaj fruktoj kaj la kutima "ron cremat" (bruligita rumo kun specialaĵoj), kiu ĝojigis la plej kuraĝajn, kiuj iomete drinkis... Estas menciinda la partopreno de la grupo *Havaneras*, kiu ludis belajn kaj neforgeseblajn historian danceblajn kantojn. La etoso estis nepriskibebla, ĉar ne mankis grupeto da homoj, kiuj dancadis kaj por fini la feston kelkaj el ni faris homan trajneton por vigligi la nedancemulojn, kiuj kuraĝis kuniĝi en la trajneto.

Abel Montagut prezentis sian duan eldonon de la verko *La poemo de Utnoa*, kiu ankaŭ estas tradukita kaj en la katalunan kaj en la hispanan. Li ankaŭ prelegis pri *La poemo de Utnoa kaj la Diluvo,* kiu rilatas al la menciita verko. Mi prezentis mian trian poemaron *La fontano de l' sorto*, kaj tuj post la prezentado kelkaj volontuloj deklamis miajn poemojn, inter ili Barbara Pietrzak, kiu bele deklamis kaj Kristine Titgat, kiu ne nur kuraĝis aĉeti mian libron, ŝi legis la tuton kaj kunprezentis la verkon per legado de pluraj poemoj kaj aldono de pozitivaj kaj  belaj opinioj pri kelkaj poemoj, kiuj surprizigis la ĉeestantojn. Mi neniam forgesos tiajn momentojn, ĉar ŝi estas profesie eksterordinara oratoro kaj deklamanto de poezio.



La kutima premio Ada Sikorska Fighiera, alĝuĝita al elstaraj geesperantistoj, ĉijare estis aljuĝita al nia kara samideanino Barbara Pietrzak, kiu ofte partoprenas La Internacian Semajnon kaj ĉiam prelegas pri interesaj temoj. Ŝi interviuis por Pola Radio, al Rosa López, kiu parolis pri la evento kaj la organizantoj de la Semajno, ĉijare katalunoj kaj du andaluzoj, mi kaj mia edzino Mariló.

Dalia Pileckiene sukcese gvidis du grupojn da homoj kun la celo trovi respondojn al "ĉiutagaj demandoj... por scii kial ŝi ne komprenas agojn/kondutojn de homoj...", la temo estis *Psikologio praktike*.

Pere Navarro prelegis pri la energio de la suno "Ĉu vi scias ke nia manĝo venas de la suno?" kun belaj bildoj kaj interesaj klarigoj pri la afero.

Xavi Alcaide prelegis pri unua mondmilito kaj prezentis kolektivan verkon tiurilate, kiu tre interesis al ĉeestintoj.

Zita Blaust bele prelegis pri sia sperto pasintjare en Nepalo, okaze de la 12-a Internacia Himalaja Renkontiĝo kaj en dua prelego ŝi rakontis kortuŝan historion pri Sindutaj Sankal, eksterordinara virino kun speciala misio sur la tero.

Luz Vázquez gvidis Diskutrondoj pri kulturtemoj kiel: Kio estas kulturo?, Valoro, varo, baro, ĉu tro da kulturo povas blindigi kaj surdigi?, Ĉu pli natura des malpli kultura?, ktp.

Kaj por fini la raporton mi devas dankegi la gvidantojn kaj ĉiĉeronojn de la ekskursoj pro ilia lerta laboro. Unue pro la pacienco akompanante piede al kelkaj dekoj da homoj, maljunaj kaj junaj tra la marbordo, ĉar piede ni malsupreniris kaj supreniris ŝtuparojn inter rokoj kaj sub varmega suno, kiu malfaciligis la aferon. La dua duontaga ekskurso okazis en la urbo Reus, kie ni ĝuis la belecon de diversaj domoj kaprice konstruitaj de “indianos”, tio estas, lokaj hispanaj elmigrintoj kiuj riĉiĝis en Ameriko kaj ni vizitis la originalan muzeon Centre Gaudí, kie ni malkovris la belecon de la modernisma arkitekturo kun pluraj maketoj pri la *Sagrada Familia*.



La tuttaga ekskurso al la urbo Sitges ankaŭ estis sukcesa kaj belega sperto, ĉar ni vizitis originalan muzeon kun granda kolekto da pentraĵoj kaj diversaj objektoj, kiu apartenis al iu riĉa kataluno, kiu donacis ĝin kun la kondiĉo ne movi la objektojn el la origina loko. kaj kompreneble ni vizitis la belan preĝejon kaj sentis la humidecon de la puraj strandoj, ktp.

**Ángel Arquillos**

# POEZIA ANGULO

## AŬTUNA BALADO

*(Poemo el la sekcio* Amkantoj *de la poemlibro* Rev-ene*, de Miguel Fernández, publikigita de SAT-Eldona Fako Kooperativa, Parizo, 2018)*

Ĉi-aŭtune
mi dezirus transiĝi de edzo en amanton,
vekiĝi re en viaj brakoj, amo,
kiel tiam,
kun la delica sento, ke ni pekis
– ho, la volupta tiklo de la peko! –
morte,
kaj peki plu ĝis plena elĉerpiĝo,
ĝis plena kaj eterna kaj mirinda kondamniĝo
kune kun vi…
Ni poste dancus
la kontraŭvalsan valson de Ravel,
aŭ la miltaktan valson de Jacques Brel,
kaj la friponan tangon el *Andaluza hundo*...
vango-sur-vange kunaj,
mano-sur-polme kunaj,
kokso-sur-kokse kaj koltorde kunaj...
kiel tiam.

Mi el mia taglibro elŝirus la foliojn
kun niaj neĝoŝtormoj en te-taso,
kun niaj etaj vintroj, rifoj, krifoj,
kiuj nin – povrajn! – foje, tamen, venkis.

Mi grimpus sur la supron de via rev' plej alta
kaj iĝus sun' por ade ĝin prilumi.

Mi surmetus mian ĉapelon feltan
kaj mod-paradus antaŭ vi en kalsoneto,
klaŭne,
por plezurigi vin ĝis rid-eksplodo,
kiel tiam.

---

[1]*Andaluza hundo*: esperantigo de originala franca titolo, *Un chien andalou*, de skandala surrealisma filmo verkita (kunlabore kun la kataluna pentristo Salvador Dalí), produktita kaj reĝisorita de la fama hispana reĝisoro Luis Buñuel en 1929.


Ni vizitus la maron en aŭtuno.
Surstrande, en duopo, tute nudaj,
ni parodius la amantajn parojn
de holivudaj filmoj:
lantamove ni kurus unu al la alia
por ĉirkaŭpreni nin en la feliĉa fino
en sursabla jubila kunruliĝo,
kiel tiam.

Kaj fine ni vizitus Parizon en aŭtuno.
Parizo ĉiam estis nepre aŭtuna urbo.
Ni vizitus Parizon, kiam – okraj,
oranĝkoloraj, flavaj –, mil folioj,
en sia plena belo velkanta kaj kortuŝa,
kvazaŭ mantelo glita, pluvmalseka,
kovras la avenuojn de Ĝarden' Luksem-
burgo.
Sur ili ni promenus
en iu ajn el tiuj raraj tagoj,
kiam la suno brilas kelkajn horojn
por tegi ĉiujn arbojn per ora splendo tia,
ke iam ĝi forprenis de mi mian animon.

– Okraj,
oranĝkoloraj, flavaj –. Ora splendo.
Parizo alnomatas la urbo de la lumoj.
Sed sole tiun lumon mi sopiras traĝui
en via kompanio.
Sole al tiu lumo mi sopiras reveni
en via kompanio.

Sole al tiu lumo,
fascina kaj terura heroldo de disfalo,
meze de ĉi aŭtuno.

*Miguel Fernández*



# DATREVENO DE DEKLARO DE ORDESA KIEL NACIA PARKO

2018 estas la 100a datreveno de la deklaro de la Valo de Ordesa kiel Nacia Parko, la dua en Hispanio post Covadonga.

En 1986 okazis tie Antaŭkongreso de SAT. Antonio Marco Botella verkis poemon en esperanto en tiu okazo. Jen tiu poemo:

Mirinda, la bela valo!
Giganta rokar' silenta!
Ĉiuj verdoj sur l' arbaro
kaj l' okroj sur rok' fiera,
dum saltas laŭ akvofaloj
brava riveret' ludema.....

Mi memoras, ja tre klara,
vian sorĉon, val' eterna:
plene hela kaj blupala,
plena je rumor' pratempa!
Ondo de parfum' lavenda
de l' altaĵoj milde venas,
miksita kun tiu buksa
ĝi l' arbaron fajne plenas.

Kiom belas la spektaklo
Arazas (*) saltante ŝtupojn!
La grandega cirk' Soaso (**)
kun gigantaj rokaj muroj!
La piruetoj sur l' akvo
far' la surprizitaj trutoj
aŭ la gratĉiela alto
de mont' Perdido en brumo!(***)

Kiom ĉarmas l' akvofaloj,
rokoj, la kolor' kaj lumo,
verdaj pinoj, kverkoj, fagoj
de tiu naturangulo!

Ne ekzistas val' pli bela!
nek rumora akv' pli brava,
nek verdoj pli vive helaj,
nek ciel' pli sorĉe rava!

La beleco de l' arbaro,
la grandeco de la rokoj,
la murmuro de la akvoj,
la silento de la montoj,
plektas tian plaĉan markon
per logaj naturtrezoroj
kiuj faras la miraklon
krei el val' belan sonĝon!

Ordesa ja, en resumo
estas: rokoj, logo, arboj,
rojoj, montoj kaj parfumoj,
brizoj, trutoj, birdoj, kantoj:
eksplodo de akv' kaj lumo!
Estas paradiza valo,
loko por la homa ĝuo!

Antonio Marco Botella

(*) Arazas: rojo naskiĝinta en la cirko Soaso kaj iranta sub formo de kaskado ekde la "Ĉevalvosto Iriso" ĝis tiu de la "Groto". Post 15 kilometroj, ĝi enfluas en la riveron Ara trapasante unue la valon Ordesa enkondukita inter montegoj ekde Goritz ĝis la ebenaĵo.

(**) Cirko Soaso: impresa loko de rokmuroj vertikalaj, rondforma, kun altaĵoj inter 400 kaj 1000 metroj, ĉe la piedoj mem de Goritz, kie komenciĝas la valo Ordesa.

(***) Monto Perdido: La plej alta montopinto de la Centra Pirenea montaro: 3.355 metrojn alta, vera reĝo reganta la valon Ordesa


ilei